INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 15 **N-ro 2, 1985**

Internacia Pedagogia Revuo – n-ro 2, 1985

Presado: Offset Massarosa, Tel. (0584) 93.090
Kompostado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antverpeno

Enhavo

1. UNESKO: La kvara Internacia Konferenco pri adolto-edukado . . . . H.S.
2. La problemo de fremda lingvo en elementaj lernejoj . . . . . Mario Dazzini.
3. Kion pensas s-ro Versteegh pri Esperanto . . . . . S.S.
4. La loko de idiotismoj en Esperanto . . . . . B. Golden.
5. Kion lernas germanaj lernantoj pri la Dua Mondmilito? . . . H. Sonnabend
   (el *Vojaĝo en la Pasintecon* de H. Ebeling – Eldonejo Westermann)
6. ILEI – Financa Raporto . . . . . Bertil Andreasson.
7. La 19-a Internacia Konferenco de ILEI en Kungälv, Svedujo . . . . *anonco.*

MARIO DAZZINI MORTIS

Nia amiko, samideano kaj Ĝenerala Sekretario ne plu estas inter ni! Vendrede, la 31-an de Majo, informis min telefone Catina Dazzini pri la morto sia frato. Je la 17-a horo de la sama tago ĉesis la batado de lia koro.

«*Il Tirreno, cronaca di Massa*», raportis pri tio: "Funebro en la Esperantista Mondo. Mortis Prof. D-ro Mario Dazzini, ĝenerala sekretario de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj honora prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, fama pedagogo kaj nelacigebla organizanto de la Esperanta aktiveco sur internacia kampo. Li atingis 74 jarojn. — Mario Dazzini estis honesta homo kaj justa, kies vivon ĉiam karakterizis grandanimeco kaj amo por la homaro en defendo de la homaj rajtoj kaj de la interkono de la popoloj. Li estis ne nur granda esperantisto, sed ankaŭ batalanto firme celanta tuj post la milito la restarigon de aktivecoj en nia provinco kaj aparte en la industria zono. Estro de la Komitato de Laboristoj, kiun li kreis, li batalis por reakiri kaj revenigi al Massa la instalaĵojn kaj ilojn malmuntitaj de la germanoj. — Post la Komitato de Laboristoj venis en 1947 la konsorcio por la industria zono Apuna, de kiu Dazzini estis la ĝenerala sekretario ĝis kiam li pensiiĝis (Septembro 1975). — La redakcio de *Tirreno* kuniĝas kun la unuanima priplorado."

Ni ĉiuj perdis neanstataŭigeblan batalanton por nia organizaĵo. Por ni, por ĉiuj, kiuj konis lin, ne estas imagebla ne plu aŭdi lian voĉon, aŭskulti liajn ideojn, ne plu vidi lin sidi inter ni. Mi nun ne kapablas skribi pri la multegaj meritoj de Mario Dazzini. Li estis dum 12 jaroj apud kaj kun mi. Mia aflikto kaj funebro silentigas min... H.S.

La Kvara Internacia Konferenco pri adolto-edukado emfazas:

"la rajton lerni" por ĉiuj

Pli ol 800 delegitoj kunvenintaj el 122 Unesko-membro-ŝtatoj partoprenis la 4-an Internacian Konferencon, traktante adolto-edukadon. La konferencon organizis Unesko en sia oficiala sidejo en Parizo.

La Unua Konferenco okazis 1949 en Elsinore, Danlando, al kiu partoprenis 30 landoj, sed 60 landoj jam kunvenis en la Dua Konferenco 1960 en Montreal, kaj konstanta pliigo pruviĝis en Tokio 1972, kie partoprenis delegitoj el 79 landoj.

Dum dektaga debato (19.O3 – 29.03) la delegitoj esprimis la saman opinion pri la prioritato de la adolto-edukado, t.e. kapabligi la adoltan homon pli efektive partopreni en la progreso de sia propra socio; plie helpi lin evoluigi sian personecon por malfermi al li la aktualajn socialajn kaj kulturajn demandojn. La konferenco konsideras tion por industriaj kaj evoluantaj landoj.

Deklaracie ĝi substrekas la "rajton lerni" ĉar tiu ĉi rajto garantias humanecan evoluadon. Lernado ne nur estas instrumento de ekonomiaj postuloj sed nekontestebla fundamenta homa rajto. La homo ne estu nura objekto de okaza kompatado sed subjekto, kreanta sian propran historion. En sia resumo de la rekomendoj la konferenco eksplikis gvidliniojn por la plia evoluado de adolto-edukado. Ĝi estas ĉefe interesata al celoj kaj politiko de adolta edukado, aplikado de transfero de konvenaj novaj teknologioj, trejnado de edukistoj, interesata al rilatoj inter adolta edukado kaj tradicia trejnado, pri analfabetismo kaj reanalfabetismo, pli bona internacia kunagado kaj al kontribuado kaj evoluado de adolto-edukado kaj interŝanĝado de informoj.

En Kanado ĉiu kvina adolto partoprenas pliklerigan kurson. En

Svedujo ĉiu tria el la popolo inter 18 kaj 65 jaroj sekvas popularajn kursojn. En Japanio estas 70 % de la laboranta popolo kursanoj kaj preskaŭ triono da virinoj. En Ĉinio 1 500 000 adoltoj partoprenis en lego-skribo-kursoj kaj la nombro de analfabetismo malaltiĝis al 23 % en 1982. Du milionoj da adoltoj en Kenjo vizitis la pasintajn ses jarojn kursojn kaj en la nuna jaro estis inter ili 80 % virinoj. En Sovet-Unio estis 4,1 milionoj da adoltoj kiuj partoprenis inter 1983/84 en kursoj aranĝitaj en 11 300 ejoj kaj 1,1 milionoj vizitas kurantajn vesperkursojn. Triono de la kuba popolo, t.e. sume 3,2 milionoj, partoprenas klerigajn kursojn. Meksiko sukcesis malaltigi la analfabetulojn de 16 al 12 % inter 1980/1984. En Zimbabwe enskribis sin en kursoj por adoltoj 380 000 popolanoj, inter ili 60 % da virinoj.

Estas postulate de Unesko ellabori projekton pri evoluado de totala eduka sistemo. Multaj delegitoj formulis tion jene:

La baza provokado de la tempo.

Urĝas koncentrigo de la organiza laboro: kreskigo de elementaj kapabloj kiel legado kaj skribado, virina edukado, ĝenerala edukado de la publiko, prizorgado de enmigrintoj kaj handikapitoj, kaj profesia trejnado de neglektitaj sekcioj.

Internacia laborgrupo senprokraste ekdebatis kaj resone konstatis, ke tiu ĉi projekto estas konsiderinda faktoro por komprenado kaj paco en la mondo. Pluraj delegitoj opiniis, ke regionaj kunagadoj pli prefere respondas al la postuloj; ili faciligas la interŝanĝon de informoj inter landoj spirite parencaj kaj similaj laŭ problemaro. La konferenco krome emfazis la neceson de sistema interŝanĝado de esploraj kaj eksperimentaj rezultoj pri spertoj en trejnado de edukaj instancoj, evoluprogramoj kaj instrua materialo; esploroj kaj eksperimentoj por evoluigi metodojn uzadi amaskomunikilojn kiel radio, televidilo kaj komputero. La novaj teknologioj promesas apartan helpon atingi edukajn celojn ĝenerale kaj aparte por adoltoj.

La konferenco ankaŭ aprezis la rolon de neregistaraj organizaĵoj kiel "neanstataŭigebla". Reprezentitaj estis 59. Pluraj delegitoj postulis rektan helpon fare de Unesko kaj la membro-ŝtatoj, kiel facilan aliron al la multflankaj, intelektecaj helpfontoj kaj ties disponrajto.

Konkludante la rezultojn de la Konferenco, ĝia direktoro ĝenerala, s-ro M'Bow, deklaris, ke la partoprenintoj konsideris, ke "adolto-edukado ludas plenan rolon kiel faktoro en la demokratiigo de edukado kaj socio, kaj ĝi devas kontinue revivigi la farendaĵojn por la homa rajto."

Parolante por Francujo, s-ro A. Gillette, direktoro en la eduka ministerio, diris ke estas grave por demonstri ke en la komplika kampo de adolto-edukado, kiel en aliaj kampoj, pozitiva kaj utila laboro por la internacia komunumo ne povus okazi sen Unesko. Li diris, ke la diskutoj evitis senfruktajn diskutojn, malfortigantaj la organizaĵojn kaj tiamaniere nur atingi negativan reputacion, kaj disponigi armilojn al tiuj por kiuj multflanka kooperativo estas malplena vorto. Estas nun la delegitoj kiuj kreu la realecon de progreso al kiu la konferenco konklude alvokas.

En la ferma ceremonio diferencaj regionoj prezentis emfaze siajn valorajn rezultojn. S-ino S. Khomenko, anstataŭa ministro pri edukado de la Ukraino, deklaris, ke la rezultoj de la diskutoj substrekas la neanstataŭigeblan rolon de Unesko, kooperative akceli la edukadon en la mondo. S-ro K. Shepadi, ministro pri edukado en Zambio, substrekis la absolutan sukceson de la konferenco, emfazante ke Unesko transvivu spite la konstantajn malfacilaĵojn. Ni ŝuldas dankon al nia politika kaj morala subtenanto. Por la bezonoj de edukado ni mobilizu materiajn kaj moralajn riĉecojn.

H.S.

La problemo de fremda lingvo en elementaj lernejoj

Pridiskuta dokumento de Wanda D'Addio kaj Giuliana Bertoni

Jenaj rimarkoj rilatas nur al la ekzameno de proponoj pri instruado de fremda lingvo en la «Programoj por la Elementa Lernejo», t.n. "Dokumento LEND", pretigita de ministeria komisiono de Italio. Ili tute ne volas malgrandigi la gravecon de la tuta programaro por renovigi elementajn lernejojn en Italio, nek kritiki ĝian bazan orientiĝon, kiun ni aprobas kaj subtenas.

La ampleksa kaj detala artikulacio de la programo pri la itala lingvo, bone enkadrigita en la ĝenerala "Premiso", trovas neniun logikan sekvon kaj neniun mencion en la programaro de la dua lingvo. Tiu ĉi ero ja aperas strange memstara sen iu ajn kunligo kun la aliaj partoj. Male oni povas pensi, ke la lernado de dua lingvo estis entenata en la programo de ia pli ĝenerala 'lingva edukado' kaj almenaŭ konsiderata ĉefe en sia 'formiga' funkcio de interkompreniĝo kaj konscio de la diversaj aspektoj de la lingvo kaj de la evoluado de la kona kapableco. Tiu ĉi konsidero mankas komplete kaj tio, kion oni reliefigas, estas ĉefe la praktika kaj instrumentala karaktero de lernado de dua lingvo. Ĉio tio estas des pli grava se oni pensas pri la ampleksa debato okazinta en Italio, precipe dum la lastaj tempoj, pri la problemoj kaj aspektoj de lingvo-edukado de la baza ĝis la supera lernejo, kun sekva insisto pri la 'transverseco' de la lingvo en la lerneja programo.

Kontraŭe al la programo por la itala lingvo, la parto kiu rilatas al dua lingvo estas malmulte pritraktata kaj konsistas nur en ĝeneralaj asertoj. La indikitaj celoj estas "nuligitaj" je ĝenerala kapablo de "interkompreniĝo kaj buŝa komunikado en la dua lingvo en situacioj rilatantaj kun konkretaj spertoj de ĉiutaga vivo" — celo, kiun oni povus fiksi tiel senkonsidere por diversaj lernoniveloj kaj kiu

per si mem havas malmultan signifon se oni ne analizas ĝin laŭ pli precizaj parametroj de socia kaj psikolingvistika tipo. Ankaŭ la didaktikaj notoj ne multe helpas klarigi la kadron, kiu daŭre restas malklara. Krom la danĝera konfuzo inter metodo kaj teknikoj, kiu tute trapenetras ĉi tiun parton, evidentiĝas kelkaj kontraŭdiroj. Oni insistas specife por akiri konsiderindan leksikonan trezoron (ĉu aktive? ĉu pasive? de kia tipo?) por enŝovi ĝin en "facilajn firmajn strukturojn" (?) kaj oni ignoras komplete ĉiun ajn konsideron pri 'funkcio' de la lernenda lingvo: celoj por kiuj oni uzas ĝin, tipoj de lernolibroj, aktivecoj. Ankaŭ se fine oni asertas, ke "en tiu ĉi senco ... la infano studas alian lingvon nur lernante ĝian uzon kiel interkomprenilon kaj komunikilon".

Tiamaniere la lernado de la itala kaj de dua lingvo ŝajnas tute malunuigita kaj tio per si mem estas kontraŭdiro al la koncepto de lingva edukado; des pli danĝera se oni konsideras la daŭrigon de la baza lernejo pri kiu oni insistas en la "Premiso". Sed granda parto de la celoj kaj enhavoj indikataj por la itala lingvo taŭgeblus por la dua lingvo, ankaŭ se adaptitaj per fazoj kaj mezuroj. Ekzemple oni konsideru la lastajn kvin punktojn de § b ["Celoj kaj Enhavoj I"] kiuj povus esti utila punkto kunliga inter la gepatra kaj fremda lingvoj:

- prikonsideri la vortsignifojn kaj iliajn interrilatojn (simileco kaj malsimileco, signifonuancoj, transiro de ĝeneralo al specifo, ktp) kaj inverse;
- akiri la signifon de ne konata vorto rezonante pri la simpla kunteksto, kiu entenas ĝin;
- rimarki en la interno de kuntekstoj kelkajn elementajn konkordancojn inter vortoj, organizante pograde tiajn rimarkojn en morfologiaj skemoj (fleksioj, modifoj, ktp);
- identigi per pensado pri la uzo de la lingvo (buŝe kaj skribe) la fundamentajn sintaksajn strukturojn;
- apliki la naturan scivolemon pri vorto al la vorthistorio, ĉefe por ilia ŝanĝo en la signifo, ankaŭ por vortoj devenantaj de fremdaj lingvoj.

Oni devas kompreni, ke inter lingvo 1 kaj lingvo 2 ne povas ekzisti hiato en la lerneja programo. Fakte, kiel dua lingvo povas kaj devas kontribui al konscio pri la lingva fenomeno kaj ĝiaj karakterizoj kaj rolo, tiel la gepatra lingvo kaj ĝiaj fakoj devas nepre esti la bazo de spertoj per kiu la infano startas por lerni alian lingvon. Mallonge, la infano devos starti de tio, kion ĝi jam konas de la lingvo kaj de tio, kion ĝi kapablas fari per la lingvo, kaj tio ne estas malmulte. Grave estas konsciigi infanojn pri tiaj iliaj konoj kaj kapabloj, kiuj estos la necesa fundamento por labori per alia lingvo. Sen tio ne povas ekzisti lingvo-lernado solida kaj formiganta.

Pri la enkonduko de fremda lingvo en niajn elementajn lernejojn, ekestas gravaj problemoj, pri kiuj ni volas pensi kaj esprimi nian opinion. Laŭ oficiala enketo okazinta je 22-06-1982, ĉe 46,77 % el la italaj familioj oni parolas *nur kaj ĉiam dialekton*, ĉe 23,9 % oni parolas *alterne la italan kaj dialekton* kaj nur ĉe 29,4 % el la familioj oni parolas *ĉiam la italan lingvon*. Tiuj ĉi ciferoj estas rimarkindaj kaj indikas la prioritaton en la lingvo-instruado en bazaj lernejoj, ĉefe dum la unuaj jaroj. Se ni volas respekti vere la identecon, lingvan kaj kulturan, de la instruada starto kaj gvidi progresive la infanon al konsciiĝo pri la vasta komunika valoro de nacia lingvo, la laboro farenda en la unuaj lernojaroj estas tiel devontiga kaj profunda — kaj la programoj preparitaj de la Komisiono, en la parto rilatanta al la programoj pri la itala lingvo, atestas tion — ke ĝi ne lasas multan interspacon por ĝeneraligita enigo de alia lingvo.

Ŝajnas ja ne oportune ke tion, kion oni ne proponas en tia formo — nome en la tuta baza lernejo, ekde la unuaj jaroj — en neniu alia eŭropa lando, oni enkonduku subite en Italion, kiu havas lingvajn problemojn internajn tiel kompleksajn kiel *neniu alia lando de Eŭropo*. En la teksto de la programoj oni parolas eksplicite pri "kvin jaroj" de elementa lernejo, tio estas pri enkonduko de fremda lingvo ekde la unua jaro, por sesjaruloj. Bonvolu pensi *konkrete* pri niaj tiom aĝaj geknaboj, ĉefe pri tiuj, kiuj en la antaŭurboj estas okupitaj per aroj da enmigrintoj, parolantaj multajn dialektojn, kaj alfrontas unuafoje kontakton kun la nacia itala lingvo. Bonvolu konsideri ankaŭ kio povas okazi en la klasoj de la unua elementa lernejo.

Favora argumento por frua enkonduko de fremda lingvo tamen

estas tiu ke *en sia infaneco* la infano lernas plej facile, kaj la komprenon pri la naturo kaj dinamiko de la nacia lingvo faciligas ĝian kontakton kun alia lingvosistemo. Ni bone scias, ke pri tiu ĉi punkto — la frua dulingvisma fenomeno — ekzistas inter la fakuloj malsimilaj pozicioj. Ni ne volas pro tio eniri la kernon de la problemo kaj ni respektas la supre menciitan pozicion. Ni havas vere nenium principan kontraŭdiron al instruado de fremda lingvo; niaj kritikoj rilatas nur al ties *maloportuneco en la nuntempa situacio.*

Tio kio interesas al ni estas: al kio utilas, antaŭ ĉio, en la kadro de lingva edukado, fari tion en la unuaj jaroj de lernado? Certe al akiro de la itala lingvo en la plej granda diverseco de ĝiaj uzoj — kompreneble samnivele kun la sperto de la aĝo dum kiu okazas la lernado — kaj tio samtempe kun la protektado de la kulturaj kaj kondutaj elementoj enkondukitaj de la lingvo uzata en la familio. La enkonduko de fremda lingvo ŝajnas pli akceptebla kiam (kaj nur kiam) la gepatra lingvo estas la itala, ĉar tiam do ni havus dulingvajn sistemojn en la sama subjekto. Sed kiam — kaj kiel ni vidis tiu ĉi estas la plej ofta kazo — la sistemoj en la subjekto estas *tri* kaj ofte en kondiĉoj de kultura landinterno limigita kaj deprimita, la altrudo de tria lingva sistemo ŝajnas prezenti grandajn malfacilaĵojn.

Alia grava problemo: *kiu instruos tiun ĉi fremdan lingvon*? Kie ni trovos la instruistojn preparitaj por tiu ĉi aĝonivelo, kapablaj kompreni la problemojn de lernado ligitajn al spertoj de interpersonaj rilatoj, de komunikado kaj interŝanĝado — inter geknaboj, inter geknaboj kaj instruisto, inter lerneja kaj familia vivetosoj — tre delikataj kaj decidaj por la estonta intermeto en la kolektivan vivon kaj por la sinteno en la socia realaĵo, kiuj instruistoj konas tiel bone *la du lingvajn sistemojn* (en la feliĉa kazo de nur du) kaj kapablas tiel bone gradigi sian instruadon, evitante ne nur la interferojn inter dialekto kaj norma lingvo (lingvo 1/lingvo 2) sed favorante la tutan lingvan formiĝon?

La danĝero estas: *konstati amasan kaj ne kontrolitan transdonon de ne enlistigitaj instruistoj aŭ ekstraj de la mezgradaj kaj superaj lernejoj al la elementaj*, kaj tio ne povos ne kaŭzi seriozajn difektojn pro la malsimila prezento de la problemoj por lingva instruado en aĝoklasoj havantaj tiel malsimilajn postulojn pri komunikado.

En la kazo ke oni volus utiligi tipe elementajn instruistojn la problemo estas: *kiu preparos tiujn elementajn instruistojn* kaj kiamaniere oni povos prepari tiel altan kvanton da elementaj instruistoj, en ambaŭ kazoj? Ankaŭ se ni ne havus aliajn kialojn de maltrankvilo, tiu de la manko de instruistoj bone preparitaj kaj de taŭgaj strukturoj (aferoj, kiuj kostas multe kaj postulas multan tempon) estus de si mem sufiĉa por malkonsili alfronti la problemon prezentitan en la teksto de la programoj.

Plej grandan maltrankvilon kreas en ni la 'sugesto' kiu en la tuteco de la teksto *aperas kiel forta premo* por unu nura lingvo por ĉiuj, nome por la *angla* lingvo "kiam ne ekzistas aliaj indikoj de prefero" — laŭ la klarigoj je fino de la paragrafo, en la italaj landlimaj regionoj.

Tiu ĉi elekto de *masiva unulingvismo* donas zorgojn laŭ diversaj vidpunktoj kaj povas en neniu kazo limiĝi al la defendo de la laboro por instruistoj pri lingvoj, kiuj fariĝus ĉiuj aŭtomate "minoritataj", nek povas limiĝi al la defendado de tiu ĉi aŭ tiu alia kulturo ligita al tiu ĉi aŭ tiu alia lingvo — ankaŭ se la malapero de lernado de lingvoj, kiuj havis kaj havas tiel grandan gravecon en la eŭropa kunteksto, ŝajnas al ni ege danĝera. Estas ja granda kontraŭ diro eĉ en la teksto de la dokumento, inter la asertoj fundamentaj rilatantaj al la utilo de frua instruado de fremda lingvo — asertoj kiuj baziĝas sur agnosko de la *formiga kaj kultura valoroj* per akiro de dua lingva sistemo — kaj *la instrumentala karaktero* de la argumentoj favore al ĝenerala elekto de la angla lingvo sola. Ja, unue oni asertas ke lernado de L 2 havas kiel celojn: "1) permesi al la infano komuniki per lingvo malsimila al sia propra; 2) helpi kaj riĉigi ĝian intelektan evoluon, prezentante alian organizilon de la scioj; 3) krei la necesajn premisojn por ke ĝi atingu internacian nivelon de informado kaj spertoj; 4) instigi ĝin per tiu lingva instrumento al kompreno por aliaj kulturoj." Kaj oni donas tiucele pedagogiajn pravigojn, kiujn oni povas rekoni *en ĉiu ajn lingvo*, ne nur en la angla! Poste, por rekomendi ĝuste la anglan lingvon, oni prezentas male utilecajn motivojn kiaj: "lingvo peranta, kiu proponas pli oftajn okazaĵojn", "ĝenerala aplikado en la amaskomunikiloj, en internaciaj interŝanĝoj kaj en la teknologia kampo", "kun specifa aludo al la lingvo de la komputiloj", kiu lasta argumento estas evidente plena sensencaĵo, ĉar kalkuliloj registras ĉiun ajn lingvon,

kiun oni enmetas en ilin, tiel planitajn kiel naturajn.

Oni bonvolu pensi ankaŭ pri la konsekvencoj de tia propono, se oni adoptus ĝin serioze kaj *ekskluzive por la angla lingvo.* Ni antaŭsentas la danĝeron de reduktita optiko en la lernado de tiu ĉi ununura lingvo; la danĝeron vidi ĝin limigita en siaj propraj valoro kaj uzo, malriĉigita en sia kapablo transdoni kulturon kaj civilizon akiritajn historie en la tempo, la danĝeron vidi ĝin eliri el la eŭropa kultura kunteksto, por la celoj, kiujn oni atribuas al ĝia instruado per formo abstrakta kaj neŭtra, ligitaj al strikte teknologia kadro kaj sur la efemera bazo de ĝia *nuntempa* utiligado.

Ni havas zorgojn ankaŭ ĉar ĝenerala instruado de la angla lingvo en elementaj lernejoj, kunportante daŭrigon same ĝeneralan en mezgradaj lernejoj, alportus fatale ĝian anstataŭigon per alia lingvo en la superaj mezgradaj lernejoj — ĉar ne eblus pensi pri studado *dum dektri jaroj* de la ĉiam sama lingvo en lerneja kunteksto — kaj tio en tempo kiam la karakterizo *ankaŭ* utileca kaj specifa de fremda lingvo havus pli grandan gravecon por gejunuloj starantaj antaŭ elekto de sia profesio.

Por la aliaj lingvoj, ĉefe por tiuj, kiuj okupis ĝis antaŭ dek jaroj 'fortan' pozicion aŭ estis sufiĉe disvastigitaj en niaj lernejoj, *okazus tiel kompleta nuligo.* Tio okazus ĉefe en la baza lernejo, kiam la formiga valoro de fremdaj lingvoj, ankoraŭ ne ligita al instrumentalaj motivigoj, permesus utiligon de granda kultura valenco, kiel riĉigo de pluraj komunikiloj kaj spertoj de aliaj civilizoj entenataj en la eŭropa kunteksto

Okazus malriĉigo kaj niveligo kultura por tuta nia lerneja sistemo, kiu bazas sian demokratan kaj dinamikan karakteron ĝuste sur la diverseco de kulturaj kontribuoj, certigitaj almenaŭ en principo eĉ se ne ĉiam realigitaj en didaktika praktiko.

La grupo LEND konstante defendas koheran pozicion de multlingvismo, precize pro formigaj kaj kulturaj kaŭzoj kaj pro la kohere demokrata sinteno de respekto por ĉiuj popoloj kaj kulturoj, de paca kunvivado kun la diversaj formoj de civilizo, kiuj en la lingvo kaj en la lingvoj trovas sian realiĝon. Alfronte al la danĝeroj de 'solvo', kiu sub pluraj aspektoj ŝajnas al ni demagogia kaj improvizita, *ni ne povas ne esprimi nian proteston kaj alarmon.*

Tradukis Prof. Mario Dazzini

Kion pensas S-ro Versteegh pri Esperanto?

"Sinjoro Samideano"

En *Hungara Vivo* 1984/4 aperis artikolo de Kees Versteegh el la Universitato de Nijmegen (Nederlando), pritraktanta lian viziton al la "Kvina Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj" en Sümeg (Hungario). La artikolo de tiu specialisto pri arabaj lingvoj, kiu nun, konekse kun sia fako, okupiĝas ankaŭ pri piĝinaj kaj kreolaj lingvoj, transpaŝas la pure lingvistikan terenon kaj tuŝas la vitale impetan problemon de la ekzistorajto de nia Lingvo Internacia. De la rajto, por kiu ankaŭ ni, uzantoj de Esperanto, iam rezervas dubojn. Tiaj duboj, kiaj gvidas al esploroj pri la fundamentaj motivoj de nia engaĝiĝo, estas laŭdindaj; male tiaj duboj, kiaj kaŭzas enfermiĝon en nian ŝatatan hobian objekton kaj elvokas malkuraĝon defendi nian lingvon kiel socie plene egalrajtan fenomenon, estas evitendaj. Ni danku Sinjoron Versteegh, ke li ne praktikas la kutiman mikson de du aferoj: la principan rajton, paroli nian lingvon sen intenca diskriminado, kun la rajto vastigi ideojn kaj celojn de la Esperanto-movado. Do, ankaŭ ni, simplaj uzantoj de Esperanto kuraĝu prezenti la problemaron el nia vidpunkto.

Enkonduke mi volas antaŭmencii mian konjekton, ke la observado de interlingvistikaj fenomenoj suferas ankoraŭ pro fortaj trajtoj de subjektiveco. La aŭtoro pravas: mankas sistemaj studoj. Interlingvistiko estas ankoraŭ tre juna scienca branĉo, ne transpaŝis ankoraŭ la sojlon de hazardaj, neerudiciaj esplorprovoj. Ni ne devas tiom ofte humiliĝi, senti nin nerajtigitaj antaŭ — iam tro akraj — refutoj de kelkaj lingvistoj. La tradukinto de la artikolo, József Kiss-Horváth, en la antaŭparolo nin atentigas pri la utilo "pense kaj mense revui, eventuale revizii iujn niajn cementiĝintajn, eble rustiĝintajn konceptojn..." Sed ankaŭ la sciencistoj sufiĉe ofte suferas pro rustiĝintaj aŭ false argumentitaj konceptoj, speciale, kiam ili entreprenas aventurajn elpaŝojn el sia limigita esplortereno an aliajn, interbranĉajn aŭ en ankoraŭ ne precize kodigitajn fakojn.

Kiom da antagonismaj lingvosciencaj hipotezoj jam profetis neeblon aŭ neprodukteblon de planlingvo! Kaj fine: nura scienco neniam plene prezentos la signifon kaj enhavon de lingvo. Lingvo estas la vivo mem; ĝi kovras ĉiujn ties faldojn; ĝi estas ankaŭ arto. Kiom da pensantaj vivuloj ekzistas, tiom da vivfilozofioj povas ankaŭ ekzisti — kaj ankaŭ tiom da lingvaj teorioj. La aŭtoro asertas, ke Esperanto estis ĉiam fenomeno eksterlingvistika. Lingvistoj — kaj kelkaj esperantistoj — plue malplivalorigu nian lingvon per la epitetoj "artefarita, nenatura", ni tamen ne humiliĝu pro tio sciĝ, ke ni tute nature kaj plenvive uzas ĉi tiun fajnan ilon, en kiu la artefariteco povas prezentiĝi nur en forigo de neregulaĵoj kaj en konsekvenca planado de ĝia plua evoluo. La aŭtoro mem malakordas kun sia klasifiko de Esperanto, kiam li post nur kelktaga restado inter junaj denaskaj esperantistoj en Sümeg malkaŝas sian admiron pri ilia kapableco interrilati lingve — kaj socie.

Tiun alian, ne lingvistikan aliron al Esperanto, Sinjoro Versteegh prezentas kiel "konstruantoj de nova socio". Li, hazarda spektinto de unu sceneto el esperantista vivo, tiel forte apogas unu el la du konstante diskutataj kaj disputataj kontraŭaj konceptoj: ĉu ni vidu en Esperanto nur lingvon aŭ unuavice ideon? Sed li nekonvinke asertas, ke Esperanto ne ofertas lingvan esprimeblon por sociaj, etnaj aŭ religiaj diferencoj, ĉar liaopinie pri tiaj diferencoj esperantistoj ne zorgas. Li estas skeptika rilate al eblo ŝanĝi la homon. Ni preterlasu kredon pri ŝanĝeblo aŭ neŝanĝeblo de la homa naturo, sed ni ĉi-tiurilate memoru, ke eĉ hazarda observanto de esperantista medio estas forte impresita de la specifa, kaj ni ne timu diri alta, kultura nivelo de nia medio. Tiu ĉi fakto bezonus multargumente disvolvitan konceptadon kaj rezonadon.

Ni danku al la aŭtoro pro lia intereso pri Esperanto, kaj ni ne devas honti pro la konjektata malintereso de aliaj lingvistoj pri Esperanto. Mi kuraĝas veti, ke percenta komparo de la lingvistika intereso pri Esperanto-parolantaro kun tiu pri alia unu-dumiliona parolantaro ne rezultus malfavore por nia Lingvo Internacia. La kvanton da indiferentaj lingvistoj, iam formikiĝinte esplorantaj en siaj provtubaj sferoj, certe kontraŭpezas interlingvistikaj fakuloj, ĉu el esperantista medio aŭ ne. Sed eĉ ne de ĉiu fakularo ni atendu solvon por niaj problemoj, kiuj estas iom pli ol pure lingvosciencaj

problemoj; ili estas problemoj de la vivo ĝenerale, do ankaŭ psikologiaj, sociologiaj, eĉ noetikaj problemoj. Ni do provoku ankaŭ aliajn sciencistojn prilumi la problemaron el iliaj vidpunktoj.

Revene al la terminoj *piĝinado* kaj *kreoliĝado*, la unua termino estas komprenebla, ĉar *Piĝino* estas lingvo. Sed *kreolo* ne estas lingvo, sed homo, kaj sub *kreoliĝado* mi komprenas "fariĝado kreolo", do asimiliĝado de ekzemple eŭropano en alia mondparto, speciale en neevoluita nacio. Ankaŭ la esprimo *redundanco*, ne troviĝanta en PIV, devus esti klarigita piednote.

Malaltvalorigon de Esperanto la aŭtoro apogas ankaŭ per aserto, ke en Esperanto ne ekzistas blasfemado. Jes, ekzistas, kvankam ĝia skalo estas ankoraŭ malvasta. Sed se Esperanton ellernos ankaŭ ŝtelistoj, rabistoj, teroristoj, vagabondoj, tiam ĝia skalo rapide vastiĝos. Ni ja povas facile interkonsiliĝi, ke la variebla leksikona riĉeco ne povas esti ĉefa objekto de niaj esploroj pri lingvaj karakterizaĵoj. Kernan signifon havas intereso de la aŭtoro pri ebleco de disdialektiĝo. Tio postulus profundan pristudon. Piĝinado de kulture neevoluintaj homgrupoj kaj de infanoj ne povas liveri taŭgan studmaterialon. Preferinde estus kompari reciprokajn influojn de kulture evoluintaj lingvoj. Funkcio de lingvo en teknike evoluinta socisistemo de estonteco disponigos al ni vastan terenon por esploro. Analogio ĉi tie ne helpas, ĉar okazos profundaj ŝanĝiĝoj de kvalito.

Se vi deziras diskuti aŭ respondi koncerne tiun ĉi artikolon, bonvolu skribi al IPR. Ni plusendos vian leteron.

Kion vi faras kun lernmalfortaj infanoj?

La loko de idiotismoj en Esperanto

Bernard Golden

En *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) "idiotismo" estas difinita jene: "nelogika aparta vortkonstruo, propra al iu lingvo sed ne al aliaj". En nova Esperanto-lernolibro por angleparolantoj (*Esperanto – The International Language de W.J. Downes), la aŭtoro asertas, ke Esperanto ne havas idiotismojn (pĝ. 7) kaj ankaŭ, ke idiotismoj havas neniun lokon en Esperanto (pĝ. 104).*

Ne nur mi, sed ankaŭ d-ro Zamenhof malsamopinias kun s-ro Downes rilate la rolon de idiotismoj en Esperanto. Kelkaj citaĵoj el verkoj de la aŭtoro de Esperanto montros sen ombro de dubo lian sintenon pri tiu ĉi demando. En letero sendita al Louis Couturat en 1905 Zamenhof skribis la sekvajn vortojn:

> *"Mi esperas, ke iom post iom ĉiuj idiotismoj malaperos kaj cedos sian lokon al esprimoj tute logikaj kaj internaciaj. Tamen laŭ mia opinio ni devas fari tian anstataŭigadon nur en tia okazo, se ni povas tion ĉi fari tute* oportune*; sed en okazo, se ni por ia idiotismo* ne *trovos pli bonan esprimon pure logikan, tio ĉi ne devas nin ĉagreni, kaj la idiotismo povas tute oportune resti kiel "esperantismo", se ĝi nur estos komune* akceptita.*"*

Du Lingvaj Respondoj ripetas la larĝan vidpunkton de Zamenhof pri idiotismoj kadre de la demando pri la Esperanta stilo. En 1906 li skribis jene:

> *"Ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj (ne multaj) idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj Esperantistoj ilin kontraŭbatalas, ĉar lingvo* absolute *logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo senviva kaj tro peza; sed kvankam kelkaj el la Esperantaj idiotismoj estas prenitaj* ankaŭ *el la lingvoj slavaj (dum aliaj estas prenitaj el aliaj lingvoj), ili tamen estas ne slavismoj, sed* esperantismoj, *ĉar ili fariĝis* parto de la lingvo.*"* (Lingva Respondo 149, 6-a eldono, 1962).

En Lingva Respondo publikigita la sekvan jaron, Zamenhof komentis pri la problemo traduki idiotismojn el aliaj lingvoj en Esperanton.

> *"Naciajn idiotismojn, kiuj ne prezentas necesaĵon, ni devas kompreneble eviti kaj ni devas peni traduki ilian sencon en maniero plej logika kaj internacia; sed tiajn esprimojn, kiujn ĉiu lingvo nepre* devas *posedi, ni devas peni en tiu aŭ alia maniero nepre* traduki, *sed ne simple* eviti *ilin, pro timo, ke nia esprimo eble ne plaĉos al la legantoj aŭ ne ĉiuj ĝin tuj bone komprenos. ... ni devas memori, ke nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la* vivo*; tial ofte (precipe en vivaj dramaj dialogoj) pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed enuige peza kaj tro kabineta."* (Lingva Respondo 150, 6-a eldono, 1962.)

Ni aŭskultu ankoraŭ unu voĉon pri tiu ĉi temo. En apendico de sia romano *La Litomišla Tombejo* Karolo Piĉ prezentas plurajn pensinstigajn ideojn pri lingvo kaj stilo en eseo titolita "La romano kaj ĝiaj lingvaj problemoj". Piĉ pledas por pli viva kaj riĉa lingvo kaj pli fleksebla stilo. Tri frazoj estas citindaj.

> *"La esperanta romano urĝe bezonas koncizan kaj elastan konversacian stilon, tiun stilon, kiu regas en normalaj interparoloj kaj hejmaj babiloj, kaj kiu diametre diferencas al la mucida lingvaĵo, kiu ŝimas en lernolibroj."* (pĝ. 247).
>
> *"La parola lingvo estas kurioza miksaĵo de skrupula precizemo kaj de facilanima, serzorga, iam preskaŭ fola leĝero."* (pĝ. 248)
>
> *"Ĉar la beletra romana sublingvo prezentas nur ĉiel privatan pure individuan parolmanieron de ĉiel privataj kaj individuaj romanaj roluloj, kiuj povas erari kaj kiuj fakte eĉ eraras, ne esprimante sin ĉiam tute ĝuste kaj korekte. Sed jen kaj jen ili, forsin, uzas eĉ parolturnojn kaj terminojn, kiujn la legantoj trovos imitindaj kaj utilaj."* (pĝ. 250)

Ĉu tie ĉi ne aŭdiĝas eĥoj de la zamenhofa vortoj de antaŭ pli ol sep jardekoj: *"pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mallonga kaj viva"*? Ĉio ĉi rilatas al la lernolibro de s-ro Downes. En la ekzercoj troviĝas ĝuste tiu "mucida lingvaĵo", kiun Piĉ malestimas, ĝuste tiaj "enuige pezaj" kunmetaĵoj de vortoj,

kiujn ankaŭ Zamenhof kondamnis! Miaopinie lernantoj pli rapide lernus la Internacian Lingvon, se en lernolibro, anstataŭ serioj da frazoj por de- kaj altraduko, estus interesaj legaĵoj verkitaj en viva lingvaĵo kaj eble spicitaj ie kaj tie per kelkaj verdaj idiotismoj aŭ esperantismoj. Kaj la plej bonaj legaĵoj por elementa lernilo certe estas tiuj en la formo de dialogoj aŭ konversacioj.

INTERNACIAJ KONFERENCOJ DE I.L.E.I.

1 – 1963 – Beograd (Jugoslavio) (28/7-1/8)
2 – 1966 – Graz (Aùstrio) (23-28/7)
3 – 1969 – Dipoli Helsinki (Finnlando) (3-4/8)
4 – 1970 – Maribor (Jugoslavio) (28-31/7)
5 – 1971 – Londono (Britujo) (3-8/8)
6 – 1972 – Budapest (Hungarujo) (18-23/7)
7 – 1973 – Maribor (Jugoslavio) (21-27/7)
Elekto de la estraro
8 – 1974 – Sonnenberg (Germanio) (17-26/7)
9 – 1975 – Humlebeck (Danlando) (18-25/7)
10 – 1976 – San Marino (Rep. San Marino) (23-29/7)
Elekto de la estraro
11 – 1977 – Luksemburgo (Luksemburgio) (14-24/7)
12 – 1978 – Gorizia (Italia) (19-27/7)
13 – 1979 – Locarno (Svislando) (20-27/7)
163 delegitoj el 5 kontin. Elekto de la estraro.
14 – 1980 – Malto (24/7-1/8)
62 delegitoj el 9 landoj
15 – 1981 – Gödöllö (Hungario) (11-21/7)
161 delegitoj el 15 landoj
16 – 1982 – Seiano (Italio) (15-24/7)
87 delegitoj el 10 landoj Elekto de la estraro.
17 – 1983 – Sintra (Portugalujo) (14-22/7)
53 delegitoj el 14 landoj
18 – 1984 – Skofja Loka (Jugoslavio) (14-21/8)
102 delegitoj el 11 landoj
19 – 1985 – Kungälv (Svedujo) (22-29/7)
Elekto de la estraro.

IPR deziras ankoraŭ ĉiam novan redaktoron.

Kion lernas germanaj gelernantoj pri la bilanco de la Dua Mondmilito?

H. Sonnabend

(El *La vojaĝo en la pasintecon*, de Hans Ebeling)

Jen la listo de mortintoj kaj vunditoj de la Dua Mondmilito:

Landoj kaj Viktimoj	Soldatoj	Civitanoj	Entute
Germana Regno (limoj de 1937)	3 760 000	2 060 000	5 820 000
Germanaj setlejoj	380 000	1 020 000	1 400 000
Aŭstrujo	170 000	24 000	194 000
Italujo	390 000	166 000	556 000
Okcidentaj aliancanoj (sen Usono)	610 000	690 000	1 300 000
Orientaj kaj Sudorienta Eŭropo (sen Polujo)	680 000	3 810 000	4 490 000
Polujo	320 000	4 200 000	4 520 000
Sovet-Unio	13 600 000	6 700 000	20 300 000
Usono	229 000	---------	229 000
Japanujo	1 200 000	5 400 000	11 800 000
Perdiĝintoj, probable mortaj	3 000 000		
Vunditoj			35 000 000

La materia damaĝo estis senlime granda. La plej grandan damaĝon en Eŭropo suferis Sovet-Unio, kies tuta oriento estis vaste detruita: neniigo de pli ol 1700 urboj, 70 000 vilaĝoj kaj 32 000 industriejoj.

Tra Francujo, Belgujo, kaj Luksemburgio dufoje iris detruega milito. En Nederlando subakviĝis grandaj terenoj sub la marnivelo, post kiam oni dum la lastaj bataladoj malfermis la digojn. Norvegujo, Danlando kaj Finnlando estis ekonomie elĉerpitaj; Polujo terure dezertigita. Italujo estis post la invadaj bataloj de la aliancanoj tiel detruita, ke ĝi estis je la fino de sia ekonomia forto. En Grekujo regis peniga malsat-mizero. En Hungarujo kaj Bulgarujo disrompiĝis la tuta ŝtata strukturo kaj ekonomio. Same en sudorienta Azio — kaŭze de japania okupado kaj usona rekonkerado

— vastegaj regionoj suferis pro la detruoj kaj la prema mizero. En preskaŭ ĉiuj regionoj, tuŝitaj de la milito, regis malsatado. Mankis loĝejoj, nutraĵoj kaj vivnecesaj rimedoj.

Eldonejo Westerman, Braunschweig, FRG

Novaj klopodoj pri popolara paco

Ĉiufoje post neniiga mondmilito kreskis la sopirego al eterna paco, kaj ke interkonsenta ligo inter la popoloj malhelpu estontece ripetadon de tiaj katastrofoj. Por tiu celo fondiĝis post la Unua Mondmilito, je instigo de la usona prezidento Wilson, la Ligo de Popoloj. Kaj je la fino de la Dua Mondmilito, ree je sugesto de Usono, oni fondis la Unuiĝintajn Naciojn (UNO).

En 1945 solene deklaris 51 nacioj en ĝia sino: *"Ni, la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj, estas firme deciditaj, savi la venontan generacion antaŭ la skurĝo de milito, kiu dum nia vivotempo alportis neelteneblan mizeron."*

Nuntempe apartenas preskaŭ ĉiuj nacioj al tiu UNO, ekzemple ankaŭ la Germana Demokrata Respubliko kaj la Federacia Respubliko Germanio. La decida instanco de UNO estas, krom la Ĝenerala Asembleo, la Monda Sekureco-Konsilantaro. Ĝi konsistas el kvin "konstantaj" membroj: Usono, Sovet-Unio, Grand-Britujo, Francujo kaj Ĉinio. Plue apartenas al ĝi dek nekonstantaj membroj, alelektitaj de la Ĝenerala Asembleo por du jaroj.

Sovet-Unio dependigis sian membrecon de la kondiĉo, ke ĉe gravaj decidoj estu unuanimeco inter la kvin konstantaj membroj. Ĉiu el la kvin membroj tial rajtas nuligi la decidon de la aliaj, nome per vetoo. Tiu ĉi rezervo originis en la profunda malfido de Sovet-Unio kontraŭ la aliaj ŝtatoj. En la sekva tempo evidentiĝis la amasiĝintaj vetooj de sovetaj delegitoj — 90-foje (!) inter 1945 kaj 1960 — kiel granda obstaklo por fari gravajn decidojn fare de UNO.

La disfalo en du potencaj blokoj

Tre baldaŭ post la militfino ekestis inter la venkintaj grandpotencoj — Sovet-Unio je unu flanko kaj la okcidentaj aliancanoj (precipe Usono) je la alia flanko — ĉiam pli fortaj malakordoj. La kaŭzo estis la ĉiam pli senkaŝa potenc- kaj ekspansi-strebado de Sovet-Unio, al kiu la okcidentaj ŝtatoj provis rezisti. La venko pri hitleraj armeoj permesis al la Ruĝa Armeo transpaŝi la frontlinion de Elbo-Saalo-Danubo. La rusaj okupantoj starigis en Bulgarujo, Rumanujo, Polujo kaj Hungarujo komunismajn registarojn tute de Sovet-Unio dependaj. Ankaŭ en la soveta okupita zono de Germanio, la hodiaŭa GDR, plenumiĝis tiu ĉi evoluo, kaj en Ĉeĥoslovakio komunisma puĉo realigis la samon. Sole Jugoslavio, sub gvidado de prezidento Tito, sukcesis stiri propranacian vojon komunisman, sendepende de Stalin.

Pro tiuj ĉi okupacioj fiaskis ĉiuj malarmadaj intencoj, proklamitaj tuj post la Dua Mondmilito. Ambaŭ potencoj eĉ komencis novan sinarmadon, pli amplekse ol iam antaŭe. Oni nun produktis precipe atombombojn kaj raketajn armilojn. Kvar jarojn post Hiroŝimo okazis prov-eksplodo de la unua soveta atombombo. En 1952 eksplodis la unua hidrogen-bombo usona, ankoraŭ multe pli neniiga ol la 'kutima', sed jam unu jaron poste la rusa. La angloj siavice fabrikis tiajn bombojn kaj sukcese testis ilin, kio igis la francojn fari same. Jam eklaboris ankaŭ kolor-haŭtaj popoloj je produktado de tiuj ĉi teruraj armiloj. Jam en 1964 Ĉinio posedis propran A-bombon kaj en 1969 H-bombon.

Paralele evoluis raketoj por transporti tiajn bombojn, kies atingokapablo fariĝis eĉ interkontinenta. Ili estas do grandegaj, malproksimen stirataj, senpilotaj pafaĵoj, kiuj kapablas rekte flugi de unu kontinento al alia, per neimagebla rapideco. Neniu angulo de la tero ankoraŭ estas sekura kontraŭ ili. Aktuale pezpreme pendadas super la tuta homaro la minacego de atombomba pereigo.

En tiu vetarmado partoprenas ankaŭ mondvastaj aliancoj de Usono kaj Sovet-Unio: vasta unuiĝado de ŝtatoj sub la flago de nura memdefendado.

Je okcidenta flanko establis sin NATO (*North Atlantic Treaty Organization*) en kiu ligiĝis en 1949 la ŝtatoj ĉirkaŭ Norda Atlantiko: Usono, Kanado, kaj plimulto el la landoj de Okcidenta Eŭropo. La Federacia Respubliko Germanio membriĝis en 1955 kaj jam tuj militisme kunlaboris. Usono prenis la gvidan rolon interne de tiu organizaĵo, sed ankaŭ en la ankoraŭ ne komunisma mondo. Sub la prezidentoj Truman kaj Eisenhower, ĝi formis en tiuj ceteraj mondpartoj defendpretajn aliancojn plane ĉirkaŭ Sovet-Unio, ekzemple la Sudorientan Pakton (SEATO) en 1954.

Ekde la komenciĝo de nia dudeka jarcento Usono evoluis al la plej forta ekonomia potenco de la tero. Ĝi produktas preskaŭ 40 % de ĉiuj industriaĵoj en la mondo. Triono de ĉiuj (?) aŭtomobiloj estas produktataj en Usono. Preskaŭ la duono de ĉiuj telefonoj en la mondo troviĝas en la oficejoj kaj loĝejoj de usonaj civitanoj. Rilate televidajn aparatojn la usonanoj posedas du kvinonojn de la monda totalo. Ankaŭ la salajroj de usonaj faklaboristoj atingis la pinton de ĉiuj tabeloj. Usono estas tiel hodiaŭ la plej riĉa lando en la mondo.

Sed ne ĉiuj homoj en Usono apartenas al la riĉa klaso. Apud nube altaj domegoj kaj gigantaj butikumadaj centroj, oni renkontas mizeraĉajn kvartalojn, kies loĝantoj estas plimulte negroj. Ni ja memoru ke oni kaptis kaj deportis iliajn prapatrojn dum jarcentoj el Afriko, por utiligi ilin kiel sklavojn en la sudaj ŝtatoj de Usono. La Secesia Milito de 1861-1865 liberigis tiujn sklavojn. Ili ne plu estis dumvive ligitaj al la bieno de iliaj posedantoj. Granda homfluo de negroj ekde tiam, unue heziteme sed poste konstante kreskante, migradis al la industriaj urboj de la nordo. En 1910 ankoraŭ 90 % el ili vivadis en la sudo, sed en 1940 tiu pocento malaltiĝis al 75 % kaj en 1970 al 50 %. Samtempe kreskis ilia absoluta nombro: de 10 milionoj en 1910 al 23 milionoj en 1970. Sed en la urboj la negroj akiris nur malbonajn loĝkvartalojn kaj laborkondiĉojn, ankaŭ tial ĉar iliaj infanoj ne ricevis sufiĉan lernejan edukadon. Ili do restas izolitaj de la cetera civitanaro. Malriĉeco, konstanta mizero kaj malkontento kaŭzas ĉiam denove rasajn tumultojn en Usono. La teroro eĉ rimarkinde eskaladas lastatempe.

Ne nur prezidento John F. Kennedy kaj lia frato Robert falis kiel viktimoj, sed ankaŭ multnombraj nekonataj civitanoj, blankuloj same kiel nigruloj. Junaj kolor-haŭtuloj kolektiĝis sub la slogano

"Black Power" (Nigrula Potenco), kun intenco perforte akiri kompletan samrajtecon en sia lando.

Tradukis: H. Sonnabend

En IPR 3/85 temos pri «Sovetunio kaj la Varsovia Pakto». Ni atendas viajn kontribuojn pri tiu temo!

Financa Raporto de ILEI 1984

Bertil Andreasson

Saldo 1984-01-01

En kaso:		159,50		
En banko «SE-Banken»		71 133,65		
En banko «Handelsbanken»		5 063,05		
En poŝtĝiro		1 951,95		78 308,15
Enspezoj:				
Membrokotizoj: por 1983	30,00			
por 1984	17 886,75			
por 1985	91,65	18 008,40		
Gajno en Ŝkofja Loka		2 330,70		
Donaco ILS		3 000,00		
Rento		8 708,63		
De konto ilek-a (UEA)		1 359,76	33 407,49	
Elspezoj:				
IPR		5 803,59		
Estrarkunsido		2 693,85		
Poŝto, telefono		7 111,25		
Bankkostoj		55,00		
Libroj, presaĵo, papero ktp.		1 650,41	– 17 314,10	
Gajno 1984:			16 093,39	16 093,39

Saldo 1984-12-31:

En kaso		541,80		
En bonhava konto:		231,34		
En banko «SE-Banken»		81 971,40		
En banko «Handelsbanken»		6 066,20		
En poŝtĝiro		5 590,80		94 401,54

En Svislando (laŭ raporto de s-ro Kurt Greutert):

Banklibreto	*Kapitalo* 84-01-01	*Rento* 1984	*Kapitalo* 84-12-31	*Ŝanĝo* 1984
162.633 sfr.	1 206,50	45,25	1 251,75	
162.721 sfr.	1 322,05	45,75	1 067,80	– 300,00
240.594 sfr.	201,35	11,35	512,70	+ 300,00
ENTUTE sfr.	*2 729,90*	*102,35*	*2 832,25*	
En svedaj kronoj laŭ kurzo 84-12-28	*9 453,64*	*354,44*		*9 808,08*

En Nederlando:

Konto ilek-a (UEA) en gld.		520,72		
En svedaj kronoj laŭ kurzo 84-12-28		1 315,33		

Entute favore al ILEI 1984-12-31 : sv.kr. 105 293,61

La prezidanto gratulas S-ron Bertil Andreasson, kaj la estraro unuanime aprobas la financan raporton.

19-a Internacia Konferenco de ILEI en Kungälv, Svedujo

Programskizo

1985-07-22 Alveno de la partoprenantoj.
Interkona vespero.

1985-07-23 Inaŭguro.
Rondpromenado en la urbo (gvidata).
Vespere akcepto de la urbo (ĉe la konferencejo).

1985-07-24 Kurso.
Laborgrupo(j) komencas labori.
Prelego prefere pri sveda temo.

1985-07-25 Tuttaga ekskurso; buse kaj boate tra la insularo.
Vizito en Marstrand.

1985-07-26 Asembleo.
Prelegoj, laborgrupoj, kurso.

1985-07-27 Kurso, laborgrupo, prelego.
Duontaga ekskurso al Gotenburgo.

1985-07-28 Konkludo, rezulto, ktp.
Adiaŭa vespero.

1985-07-29 Fermo.

Prelegoj (provizora listo)

Docento Ebbe Vilborg: La sveda lingvo.
Bertil Andreasson: La sveda lerneja sistemo.
Iva Åberg: Sveda infanliteraturo.
Malte Markheden: Svedaj birdoj.
Oskar Svantesson: El la historio de ILEI.
Bertil Wennergren: Sugestopedio.

Aliaj programeroj

Popoldanca grupo.
Popolmuziko.
Filmo.
Muziko (Iva Åberg).

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo	: Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo	: Karl Hirmann (estro de SAEI-Societo de Aŭstriaj Esperanto-Instruistoj) Rannachstr. 3 A-8046 Graz.
Belgujo	: Marc Demonty - Avenue des Missionnaires 39/B5 – B +1080 Brussell.
Brazilo	: Elvira Fontes - Rua Machado de Assis, 243 ap. 11 – 04106 Sao Paulo SP.
Ĉinujo	: Zhang Danchen Huazhong, Normal Universitato Hubei Wuhan.
Danujo	: Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo	: Pentti Jarvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Francujo	: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
F. R. Germanujo	: Sonnabend Ruff Karin, Rodeweg 8 3155 Edemissen.
Grekujo	: K. Koliopoulos, str. Melissou 1, Pagrati, Gr - 11635 Ateno.
Hispanujo	: Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
Hungarujo	: Márta Kovács Ady E. u. 23-25/C H-1221 Budapest.
Israelo	: Josef Murĵan, p.c.k. 1289, IL-61012, Tel Aviv.
Italujo	: Catina Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa.
Jugoslavio	: Anica Hurĉak, Polic-Kamova 91/III, Yu - 51000 Rijeka.
Nederlando	: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, 8162 NC Epe.
Nordameriko	: Arthur Eikenberry, 621 Aurora Ave., Santa Barbara, Ca 93109 USA
Pollando	: Irena Szanzer Lewartowskiego 9 m. 17 PL- 00185 Warszava.
Portugalio	: Alexander Kasesa, Calç° Duque Lafoes 26 2° p. – 1900 Lisbono.
Sanmarino	: Marina Michelotti, Contrada del Collegio, 51 – I-47031 Repubblica di San Marino.
Sud-Afriko	: Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen.
Sudakoreujo	: So Gil Su – Sodemun P. K. 59, Seŭlo 120.
Svedujo	: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby.

Izolitaj Membroj

Ĉeĥoslovakujo	: Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26215 Borotice.
Ĉinujo	: Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Germana D. R.	: Til Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brüel.
Kubo	: Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Luksemburgo	: Robert Hoegener, 4 rue des Charbons, Esch-sur-Alzette.
Malagasujo	: Eugene Raveloson, B.P.1663 – 101 Antananarivo.
Malta	: Anthony Mercieca – 20 Valletta Road – Qormi.
Sovetujo	: Johannes Palu, Sõlme 21, SU – 200016 Tallinn, Eesti NSV.

Estrato de ILEI

Prezidanto:	rektoro Helmut Sonnabend, Rodeweg 8 3155 Edemissen.
Vicprezidanto:	Ania Hurĉak, Polic-Kamova 91/III, YU-51000, Rijeka, Iugoslavio.
Sekretario:	d-ro prof. Catina Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa. (intertempe) Italujo.
Vicsekretario:	prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.
Financoj:	Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24200 Hörby, Svedujo.

Kunlaborantaj Organizoj

EEC	Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brussel (Belgio). Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.: S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussell.
FIMEM	Féderation Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne – 35 Avenue Jottrand 1030 Bruxelles Belgique. Tel. 02 277 49 36.
ICEM	Esperanto – I, rue Galissonnière – Le Pallet – F - 44330 Vallet - Francio
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.
UEA	Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
UNESKO	Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoj, F-75007 Paris. Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko: Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare
redaktas: Helmut Sonnabend, Rodeweg 8 3155 Edemissen
FR Germanujo

Membreco en I.L.E.I. (40 svedaj Kronoj jare) inkluzivas la ricevon de IPR.

abonprezo por nemembroj: 40 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj aerpoŝton)

Kontoj:

1. poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI . Södra Rörum pl. 455. S- 242 00-Hörby. (Svedujo)

2. poŝtĝirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 — UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro